

# BONA ESPERO



## Cirkulero 58

### por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.

prezidanto: Otto Nelken,  
Hirschfeldstr. 6, D-59581 Warstein, ☎ 02902-57460  
✉ u.nelken@t-online.de

Warstein, 2002-03-23

Karaj geamikoj kaj subtenantoj,

feliĉe Bona Espero nuntempe travivas grandan atenton kaj teorie (fako- aŭ jarmonografioj de gimnazianoj) kaj praktike. Tiel denove volontulo el Germanio restis en la infanvilaĝo kelkajn monatojn.

Sed unue pluraj citatoj de Ursula el la lasta detala letero el Bona Espero:

“Nia Kristnaska festo estis kiel kutime brila. La infanoj, sub la gvidado de Adarci kaj Cassius, prezentis spektaklon kun muziko kaj kantoj. Ni komencis la novan jaron kun multe da entuziasmo. Niaj geamikoj Moacir kaj Glorinha pasigis la finjaran festojn kun la familianoj en Recife, sed ili estas revenantaj por daŭrigi la kunlaboradon en Bona Espero, kiun ni esperas esti ...dumviva!

Pri volontuloj, krom Orlando kaj la instruistino Ursula, alvenis dum la lastaj monatoj juna esperantisto Cassius, el Pato Branco. Li apartenas al la grupo, kiu organizos la kongreson de TEJO en tiu urbo kaj intencas restadi ĉe ni dum 2002 por instrui matematikon. Adarci, kiu ĵus diplomiĝis pri Historio en la Universitato de Formosa, ricevis la rajtigon plentempe instrui en Bona Espero, t.e. matene en la unua kaj dua klasoj kaj posttagmeze en la tria kaj kvara. Tiamaniere, ŝi ne plu devos instrui ĉiuvespere en Alto Paraiso. Kun ŝi kaj Cassius ni povos ankaŭ komenci, iom post iom, instrui la infanojn pri komputiloj danke al la nova aparato kiun ni aĉetis per via helpo. – ...Ni dediĉis grandparte de via helpo 2001 al renovigo de nia lernejo, ĉar la malnova konstruaĵo vere bezonas grandan reformon. ...Nuntempe nia per-radia telefono havas seriozan problemon kaj ĝi sporade funkcias nur dumtage. Ni estas klopodantaj solvi la problemon per la nova teknologio de telefonio.”

Raporton specialan skribite en rimarkinde bona Esperanto sendis al ni la volontulo Tobias Spelz pri sia tri monata restado en Bona Espero:

„Kiam mi pensas al mia tempo en Bona Espero, multaj belaj memoroj flugas en mia kapo. La tri monatoj, dum kiuj mi restis en la lernejo, estis granda aventuro kaj grava periodo en mia vivo.

Sed unue mi volas rapide komenci klarigante kiel mi venis al Bona Espero.

En mia lernejo (mi faris la abituron en 2001) estis fako kiu nomiĝis „literaturo“. Estis la tasko skribi monografion en la tempo de unu jaro pri temo de nia elekto. Unu el miaj amikoj kaj mi, ni antaŭe aŭdis pri Esperanto. Sed ni ne havis grandan konon pri la lingvo. Sed post la jaro ni estis pli spertaj kaj tre ŝatis la simpatan lingvon. La produkto de nia laboro estis monografio de almenaŭ 75 paĝoj, en kiu ni informis pri la historio de Esperanto, pri la gramatiko kaj pri Esperanto - asocioj – kaj pri Bona Espero. En magazino mi legis ke Bona Espero serĉis helpulojn. Tio estis mirakle por mi, ĉar mi havis la sonĝon pasigi tempon en la eksterlando post la abituro. Du mesaĝoj per la interreto sufiĝis por havi la certecon : mi iros al Brazilo! Per interreta kurso kaj lernlibro mi lernis Esperanton. La brazilano Moacir, kiu venis por preni min de la flughaveno, estis la unua ulo kun kiu mi parolis en Esperanto – kaj tio funkciis senprobleme !



En Bona Espero atendis min paradizo. Ursula montris al mi la konstruaĵojn, la legomejon, la belan futbalejon (vidanta tion mia koro saltis), la lagon, la akvofalon kaj ĉiujn aliajn belegajn lokojn. Ursula kaj Giuseppe estis tiel afablaj kun mi, ke mi nur povis sentiĝi tre feliĉe.

Ankaŭ la 35 infanoj estis tiel simpatiaj; ili ridis ĉiam kaj estis tre kontentaj en Bona Espero. Kvankam mi komence nur planis resti por du monatoj, mi plilongigis mian restadon ĝis tri monatoj. Mi tre ŝatis mian laboron instrui Esperanton al la infanoj. En malgrandaj grupoj ili

**donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ/bankkodo 464 510 12)**

kasistino: Dagmar Rahn, Hirschfeldstr. 3, D-59581 Warstein, ☎+49-(0)2902-700330, ☎+49-(0)2902-700328

lernis la nomojn de la infanoj, vestaĵoj, lokoj, kuirejiloj ktp.. Mi rimarkis de la komenco ke estis plezuro por la infanoj povi paroli en Esperanto. Kiam mi ne instruis Esperanton, mi laboris en la legomejo, plantis arbojn, akvumis la plantojn, iris kun la infanoj al la lago aŭ ludis futbalon. Preskaŭ ĉiutage la infanoj, aliaj helpuloj kaj mi renkontis sur la futbalejo kaj havis grandajn « batalojn ».

Kompreneble ni ankaŭ spertis ekscitajn aventurojn en Bona Espero. Ekzemple kiam brazila bandito, kiu eskapis el la malliberejo, aperis en Bona Espero kaj timigis ĉiujn (finfine la polico venis kaj reprenis lin en la malliberejo). Estis ankaŭ surprizo por ni kiam fulmo detruis la antenon de la telefono!

Sed la vera aventuro en Bona Espero ne estas tiuj spertoj, sed la ordinaraj tagoj. Estas por tio kial mi admiras la laboron de Giuseppe kaj Ursula. Por mi la laboro en Bona Espero estis nur tri monatojn. Sed Ursula kaj Giuseppe estas ĉiam tie kaj zorgas pri la infanoj kiuj bezonas la helpon. Tio estas la vera aventuro kiu estas admirinda. Por la infanoj Bona Espero estas la lasta ŝanco eskapi el la danĝera mizero de la brazilaj stratoj.

Kun Giuseppe kaj Ursula laboras ankaŭ ankoraŭ aliaj helpuloj en Bona Espero. Estas ekzemple la brazila geedza paro Gloria kaj Moacir, kiu vivas en Bona Espero kaj helpas zorgi pri la infanoj. Aŭ la instruistino Ada, kiu mem iris en Bona Espero al la lernejo kiam ŝi estis infano kaj poste povis viziti la universitaton. Alia helpulo estas la brazilano Mauro kiu konstruis domon apud Bona Espero kaj instruas kanti kaj ludi la gitaron al la infanoj. Li estas tre inspirita de la Esperanta ideo kaj lernas tre diligente. Oni vidas, ke Bona Espero estas tre speciala loko, kien multe da homoj venas kaj laboras.

Unu vorton ankoraŭ al miaj spertoj rilate al Esperanto. En Bona Espero mi rimarkis ke Esperanto estas pli ol ordinara lingvo. Ekzistas spirito en la ideo, kiu estas prezenta en Bona Espero. Unufoje mi staris kun la itala Giuseppe, la brazila helpulo Cassius kaj pola vizitanto. Kvankam el kvar malsamaj nacioj, ni parolis en unu lingvo, Esperanto, kaj povis komuniki senprobleme. Tio estis tre speciala sperto por mi.

Ankoraŭ nun mi ofte pensas al Bona Espero kaj ĉiam admiras la fortecon kaj pasion de Ursula kaj Giuseppe por la laboro kun la infanoj. Mi certas ke ili kunpretigas per Bona Espero la vojon al mondo pli bona. »


Post tiuj interesaj kaj preskaŭ entute pozitivaj informoj ni povas limiĝi je kelkaj, mallongaj detaloj.

Abituriento el Warstein, kiu lernas Esperanton ekde duona jaro, planas post sukcesa abituro suportnikon en Bona Espero. Unu el liaj kunlernantoj ĵus skribis monografion pri la infanvilaĝo, kaj estas kun tio jam la tria junulo en unu jaro kiu okupiĝis intence pri Bona Espero kaj

tiamaniere supozeble plialtigas ties gradon de konateco.

Dum la lasta IF (Internacia Festivalo) ni raportis kadre de informa aranĝo pri la UK en Brazilo ankaŭ pri Bona Espero. Oni planas dum rondvojaĝo post la kongreso viziton en la infanvilaĝo. – Dum la venonta Printempa Semajno Internacia (PSI) oni ripetos ties tombolon el 2001. Kiel vi vidas, estis kaj estas sukcesaj la « specialaj gardanĝeloj de Bona Espero » (citato de Ursula) kaj espereble daŭrigos fari tion.

Al ni tial nur restas denove la korega danko al ĉiuj malnovaj, sed ankaŭ novaj amikoj, kiujn ni ŝatas saluti precipe en nia rondo. Kaj kiel ĉiam sekvas al la danko la urĝa peto helpi nin same plue ĉe la laboro por Bona Espero.



*En la nomo de la tuta estraro  
mi deziras al vi  
pacan kaj gajan paskon !!*

*Paulo Niek*

**donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ/bankkodo 464 510 12)**  
kasistino: Dagmar Rahn, Hirschfeldstr. 3, D-59581 Warstein, ☎+49-(0)2902-700330, 📠+49-(0)2902-700328